

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Eldonata de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

Jarkolekto 8

N-ro 1, 1978

Pizo, Italujo

enhavo

<i>Gianfranca Taddei Braschi</i> – Instruado de Esperanto laŭ la lingvistikaj teorioj	1
<i>H. M. Schippers</i> – Instrui per televido: rimarkoj kaj spertoj	8
<i>U.E.A.</i> – Projekto de UNESKO pri asociiĝintaj lernejoj	13
<i>Mogens Groth</i> – La verbo, la spino de la lingvo	19
*** – Protokoloj de la ILEI-estraro en Parizo	21

Instruado de Esperanto laŭ la lingvistikaj teorioj

de Gianfranca Taddei Braschi

Oni devas antaŭdiri, ke ne ekzistas recepto por instrui, tiel ke, trafoliumante receptlibron oni povas trovi, je fiksita paĝo, sian instrumentodon. Do, estas bone ke, ekinstruante iun ajn lernobjekton, ĉi-okaze Esperanton, oni ne plenumu ĝin empirie sed sin preparu kiel eble plej multe kaj serioze pri la lingvistikaj teorioj kaj la metodologiaj spertoj. Tiu ĉi humileca konduto estas la necesa kondiĉo por serioza kaj fruktodona laboro. La prepariĝo je ĉiu nivelo estas grava afero. Mi volus diri, ke la unua prepariĝo estas bona kono de la instruota lingvo. Tio ŝajnas diro superflua, tiom necesa la afero estas, sed ĉi-rilate mi iomete embarasiĝas ĉar, se de la lernejo Oltresavio oni estus petinta instruiston lingve preparitan, mi pensas ke la eksperimento pri Esperanto certe ne estus komencinta en la jaro 1972, kiel male okazis.

Mi devas konfesi ke, kiam mi komencis instrui Esperanton, mi tute ne majstris la lingvon, ĉar mi ĵus estis plenuminta la unuagradan kurson, kaj tute mi ne havus la kuraĝon komenci la instruadon, se la esperantistoj ne puŝus min amike en la aferon. Nun, post kvin jaroj, la eksperimento daŭras sufiĉe sukcese. Ĉi tiu mia konfeso ne signifas, ke mi ne kredas je la neceso majstri la lingvon ekde la komenco: kontraŭe, mi estas tute konvinkita pri tiu neceso, sed se la cirkonstancoj estas favoraj al enkonduko de Esperanto kaj mankas la suprediritaj kvalitoj, mi opinias, ke oni povas prave kuraĝigi la instruadon, kondiĉe ke oni havu bonan volon kaj sindediĉon. Estas malpli "dangere" instrui Esperanton sen bona lingva kono, ol instrui alian lingvon en la samaj kondiĉoj, kaj tio pro la facileco de Esperanto kompare kun aliaj lingvoj, kio permesas plenigi la mankojn dum malpli longa tempo.

Supozante do, ke oni jam havas bonan lingvan preparitecon, mi opinias, ke estas bone esplori la diversajn lingvistikajn teoriojn kaj la didaktikajn metodojn uzitajn en la instruado de fremdaj lingvoj por starigi propran instrumentodon laŭ la bezonoj de siaj lernantoj kaj de la specifa situacio en kiu oni instruas.

Iu instrumentodo fakte povas rezulti optimuma en Chiavari pro tieaj specifaj cirkonstancoj, kaj samtempe esti neebla en Cesena. Al ĉi tiu detalo, kiun nepre oni ne devas preteratenti, ni revenos poste, kiam ni estos trarigardintaj la div-

ersajn metodologiajn eblecojn.

Antaŭ ĉio ni devas konsideri, ke la metodologioj estas la praktikaj aplikoj de la lingvistikaj teorioj, kaj ke la celo de la lingvistiko ne estas doni regulojn, sed nur pristudi la lingvon.

Sed mi ne intencas ĉi tie alfronti paroladon tre kompleksan, kiu estus longa krom superflua, kaj pri kiu mi ne estas preparita. Sufiĉas nun mencii la plej gravajn etapojn de la longa vojo de lingvistiko.

Jam en la antikvaj tempoj la homoj alfrontis lingvistikajn pristudojn, sed oni traktis unuafoje en Grekujo la temon kiel specifan problemon.

Tiu unua paŝo estis grava, kvankam teorio kaj praktiko ankoraŭ interplektiĝas. Fakte, la lingvistikaj verkoj estas simple gramatikoj, kaj tiuj gramatikoj estas preskrib-specaj: "tiel skribis la grandaj aŭtoroj, tiel oni skribu". Neniu intereso por la lingvo parolata kaj por la neformala uzo de la lingvo. La grekaj gramatikistoj estas la unuaj, kiuj alfrontis priskribon de lingva sistemo. Iliaj verkoj estis modelo taksita kiel imitenda unue en la latina mondo, poste ĝis la moderna epoko. La negativa heredaĵo de la klasika gramatiko kuŝas en la tendenco transporti lingvistikajn kategoriojn de unu lingvo al alia, kie verŝajne ili ne ekzistas. Ekzemple la latina, pro la manko de artikolo, la uzo de kazoj, la verba sistemo, estas tre diferenca de la greka kaj de la latindevenaj lingvoj. La diferenco pli grandiga, se ni rigardas la ĝermandevenajn kaj la ekster-eŭropajn lingvojn.

Oni povas diri, ke la "Ars grammatica" redaktita de la latino A. Donatus en la 4a jc. estis la lernolibro, kiun oni uzis en la lernejoj dum la tuta mezepoko, la Renesanco kaj ĝis la 18a jc. Kvankam en la lernejoj oni legis la klasikajn verkojn, tamen la gramatiko restis la plej grava celo en la lingva instruado, kaj por la fremdaj lingvoj oni imitis la procedon de la latina.

La dedukta gramatika metodo regis dum la 18a jc. kaj ankaŭ en la 19a. La startpunkto de tiu metodo estas la 'regulo', kaj de la regulo oni formas la frazon. Temas pri la sinteza skolo, kies principo estas: 'lingvo konsistas el vortoj kunigitaj laŭ fiksitaj reguloj, sekve — unue oni lernu la vortojn kaj la regulojn, poste oni konstruu frazojn pere de ili.'

Kutime oni konstruas frazojn, kiuj havas neniun kunligon inter ili kaj kun la ĉiutaga vivo. En kelkaj lernolibroj ili estas vere strangaj: en angla libro oni ekzemple legas jenan frazon: "La ĝardeno de mia avo estas pli larĝa ol la poŝtrancilo de mia onklo".

Estas en 1500-1600 ke novaj perspektivoj malfermiĝas al la lingvistiko. Precipe ĉe la skolo de Port-Royal ia revolucio efektiviĝas pri la pensmaniero. De Descartes kaj Locke devenas la jenaj principoj: la homoj ĝenerale pensas sammaniere, havas la saman mensan strukturon; la diversaj lingvoj diferencas nur supraĵe, sed rilate ilian profundan strukturon ili estas la samaj, ĉar ili prezentas la saman mondon de ideoj.

De tio originas kelkaj principoj de la moderna lingvistiko (Chomsky):

1. Malantaŭ la supraĵa gramatiko de la unuopaj lingvoj, ekzistas alia gramatiko, diversa, pli profunda.
2. La komuna, universala gramatiko de la lingvoj deduktiĝas ne de la supraĵaj gramatikoj, sed de la universalaj leĝoj de la penso kaj de la formiĝo de la ideoj.

En la metodologio Comenius indikas al ni novan kaj revolucionan vojon. Anstataŭ la studado de la gramatikaj reguloj, li proponas ekpaŝi de la parolado kaj alveni al la gramatiko indukte. Plie, li indikas pli aktivan kaj konkretan manieron fari lecionon per bildoj kaj konkretaĵoj. De la indikoj de Comenius devenas la analiza skolo, kiu proponas kiel startpunkton de la instruado la legadon de teksto, kiun poste oni devas analizi en ĝiaj lingvistikaj elementoj. La leciono povas procedi laŭ la jenaj punktoj: legado de teksto, konversacio pri ĝi (resume kaj dialoge), kaj fine gramatika analizo. Alia trajto de la instruado kiu fontas el Comenius estas la aktiva, rekta instruado pere de taŭgaj iloj por konkretigi la lecionon.

Oni povas diri, ke en la 19a jc. la lingvistikaj studoj havas akcelon dank' al kiu la lingvistiko fariĝas memstara lernobjekto. Post empiria tendenco havanta sian centron en Anglujo, kiu insistas pri la originala diverseco de lingvoj, racionalista tendenco kun centro en Francujo, kiu rekonas en ĉiu lingvo universalan gramatikon, komenciĝas en Germanujo la historia kaj kompara lingvistiko. La lingvoj ne estas plu rigardataj laŭ ĝiaj propraj karakteroj, sed lokitaj en la fluado de la tempo kiel rezulto kaj samtempe startpunkto de aliaj lingvoj. La lingvistoj observas, ke la lingvoj ŝanĝiĝas, ke la ŝanĝoj ne estas hazardaj, kaj en kelkaj lingvoj oni povas konstati similecojn kaj parencajn trajtojn. Kompara studo de la indoeŭropaj lingvoj kondukas al pruvo de iliaj parencaj rilatoj kaj al la rekono de precizaj reguloj, kiuj regas ilian transformadon, apartigon kaj realproksimiĝon. La reto de la parencaj rilatoj estus devinta permesi malantaŭeniri ĝis komuna pralingvo, t.e. la indoeŭropa; lingvo, kiun oni esperis rekonstrui.

La kompara kaj historia konceptoj transportiĝas en metodologion kaj oni komencas en la lingvoinstruado valorigi la lingvistikan komparadon kaj la generajn aspektojn. La subtenata principo estas, ke oni ne povas bone koni lingvon ne konante samtempe ĝian historion. Efika estis la kompara studo inter parencaj lingvoj, ekz-e latina-franca, aŭ germana-angla. Tiu tendenco, nomata genera, staras duonvoje inter la sinteza skolo kaj la analiza, kaj bazas la studmaterialon sur la historio kaj la lingvokomparo.

Surbaze de la komparaj studoj de la 19a jc. evoluis la moderna lingvistiko, kiu donas sistemajn kaj sciencajn formulojn al la supraj opinioj pri la lingvaj procesoj. La nomo de la lingvisto de Saussure kaj precipe lia verko "Cours de linguistique générale" (1916) markas decidan etapon en la historio de la lingvistiko. Liaj teorioj: la koncepto de lingvo kiel aŭtonoma sistemo de interrilataj elementoj, la distingo inter 'langue' kaj 'parole', du analizniveloj (signifo kaj signifanto), la kontraŭstaro de sinkronio kaj diakronio, troviĝas je la bazo de tiu granda studdirektado, kiu nomiĝas strukturismo kaj artikiĝas je multaj branĉoj. De de Saussure ekiras fakte la skoloj de Prago kaj Kopenhago, la 'mensismo' kaj 'konduktismo' usonaj, la funkcia lingvistiko, la transforma gramatiko. La strukturismo ne konsideras la lingvon kiel aron da izolitaj elementoj, sed asertas, ke la elementoj estas partoj de strukturo, kaj rilate la funkcion ili estas determinitaj de la strukturo mem.

Saussure komparis la lingvon al la ŝakludo, en kiu ĉiu movo modifas la ekvilibron de ĉiuj rilatoj; sammaniere lingvo ne estas aro de malhomogenaj elementoj,

sed artikita sistemo, kie "tout se tient" t.e. ĉio estas solidara kaj ĉiu elemento akiras valoron el sia pozicio en la strukturo.

Kiel kutime en la metodologion oni transportas la konceptojn de la lingvistikaj studoj; pro tio ni retrovas je la kerno de la instruado la strukturon, kaj sekve la serĉadon atentan de la vorttrezoro kaj de la reto de la bazaj strukturoj. Nuntempe novaj vojoj malfermiĝas por la lingvistika esploro, sed mi dirus, ke en metodologio ni estas ankoraŭ sub la influo de la strukturismo. Je larĝaj trajtoj tio estas la vojo trairita de la lingvistoj ekde la antikvaj epokoj ĝis la nuntempo.

Mi faris nur simplan skizon, kiu havas nur la celon inviti pli profunde studi kaj espereble helpi nin kompreni aŭ intuiĉi la kialon de la ekzistado de tiom da diversaj metodoj en lingvoinstruado. Mi volus nun pli detale alfronti la temon pri la metodoj de instruado de Esperanto. Antaŭ ĉio, mi devas diri, ke en la instruado de Esperanto oni adoptis ĉiujn metodojn, kiujn oni sekvadis en la instruado de lingvoj. Tion oni povas cetere dedukti de la gramatikoj skribitaj ekde 1887 ĝis nuntempe. Estas gramatikoj, kiuj sekvas la dedukta-sintezan metodon, kiu estas la plej tradicia. Jen la skemo de la leciono: gramatikaj reguloj, ekzercoj de tradukado, vortrezoro.

Kvankam tiu metodo estas ĝenerale superita en la instruado de lingvoj (ia-specaj), por la instruado de esperanto ĝi ne estas forĵetinda, almenaŭ parte. Fakte, la simpleco de la Esperanto-gramatiko estas tia, ke paroli pri gramatiko ne estas balasta afero por la lingva instruado, sed male helpa. Mi ne konsentas, ke leciono baziĝu nur je la gramatika instruado, tion mi nepre forĵetas, sed programante lecionon, flanke de la konversacio kaj de la aktiva parto, kiu estas la plej moderna indiko, oni povas tute prave inkluzivi gramatikan parton. Libro, kiuj sekvas tiun metodon estas abundaj; inter la italaj ni povas citi: Grazzini, Bardini, ktp. Estas gramatikoj, kiuj sekvas la indukta-analizan metodon, t.e. la kontraŭan metodon de la antaŭa; anstataŭ ekiri de la gramatiko, oni ekiras de Esperanto-teksto. Skemo de tia leciono estas: dulingva teksto, frazoj, gramatikaj rimarkoj. Tiu metodo estas pli aktuala, ĉar gramatiko ne estas deira punkto sed alvena.

Analiza metodo estas ankaŭ la interlinia. La deira punkto de tiu metodo estas literatura teksto, kiu estas unuatempe tradukita laŭvorte per interlinia metodo. En la sekvantaj lecionoj, la jam konataj vortoj estas preterlasataj. Ju pli antaŭen oni procedas, des pli multaj estas la malplenaj spacoj en la traduko, ĝis kiam la lernanto kapablos traduki senhelpe.

Estas poste la konversacia metodo, kiu bazas la lecionon sur la konversacio. Ekira punkto povas esti jam preparita dialogo aŭ enkondukita de pritema bildo; sekvas la gramatikaj rimarkoj. Tiun metodon sekvas ekzemple la gramatiko *Esperanto for alla*.

Ekzistas ankaŭ miksitaj metodo, kiu estas eble la plej sekvata, se oni kalkulas ke absolute ĝusta metodo ne ekzistas. Miksitaj metodo estas precize tiu, kiu kunmetas la pozitivajn aspektojn de la diversaj metodologiaj indikoj. Tiaprincipe ekzistas diversaj tekstoj, ekzemple *Tom kaj Tina* de O. Nederland, *Esperanto en du partoj* de Rakuša, *Nia mondo* de A. Rebers, ktp. En la skemo eniras iom da ĉio: rakonto, konversacio, vortaro, gramatiko, kaj tradukaj ekzercoj.

Krome estas la rekta metodo, kaj rilate Esperanton paroli pri rekta metodo signifas paroli pri la hungara instruisto Andreo Cseh, kiu ĉe la komenco de la jaroj 1900 signis revolucion en la esperanta instruado. Kvankam li ne lasis librojn, kaj lia metodo estas malfacile ripetebla ĉar lia instruado baziĝis antaŭ ĉio sur liaj nekompareblaj personaj kapabloj, tamen li malfermis vojon al instruado de Esperanto.

Lian metodon oni povas sintezi en kelkaj punktoj:

- lecionoj estas farataj nur en Esperanto; nacia lingvo estas forigata
- pli ol lecionoj, temas pri konversacioj pri konkretaj temoj, aspektoj de la ĉiutaga vivo, faktoj interesaj por la lernanto, kaj ĉio estas traktata sprite, gaje, dinamisme kaj precipe tiamaniere, ke la lernantoj estas incititaj paroli pli ol la instruisto mem
- pli ol la individuaj respondoj, estas stimulataj la ĥorajn, por ne malkuraĝigi la lernantojn, kiuj havas malfacilaĵojn
- pli bone instrui sen lernolibro, pro psiĥologia faktoro, ĉar sen lernolibro la lernantoj estas devigataj pliatenti la lecionon
- oni devas procedi malrapide en la disvolviĝo de la programo, kaj ĉe ĉiu nova leciono oni devas sin certigi, ke la antaŭa estas bone lernita
- en la rekta metodo, oni devus preterlasi gramatikon, sed Cseh —precize pro la karaktero de Esperanto— uzis ĝin sed tiel, ke la lernantoj trovu la gramatikan regulon per indukta rezonado. Tiel ĝi fariĝis eltrovo de la lernanto
- la instruisto devas prepari akurate ĉiun lecionon, por majstri la lernobjekton kaj regi la lernantaron.

Por havi ideon pri la kvalitoj de Andreo Cseh kiel instruisto, mi opinias sufiĉe diri, ke li komencis instrui al grupo da laboristoj diversnaciaj, kompreneble dum vesperaj horoj, kaj li sukcesis forgesigi al ili la lacecon enkorpigitan dum la peniga labortago, kaj igi ilin aktive partopreni la lecionon. Prave li sugestis: en la instruado la plej grava fakto estas la personeco de la instruisto: li povas sukcesigi la plej malbonan metodon, kaj povas detruji la plej bonan. Kelkaj tekstoj, kiuj sekvas la rektan metodon estas *Esperanto por infanoj* de Gladstone, *Sub la verda standardo* de Korte, ktp.

Tre proksima al la rekta metodo estas la natura metodo. La ĉefa ideo estas, ke en la frazoj la novaj vortoj estas klarigataj de la kunteksto; desegnoj kaj bildoj jam de la komenco povas helpi la komprenadon; naturmaniere estas prezentataj ankaŭ la gramatikaj formoj. Ekzemplo de naturmetoda teksto estas *Privilegia vojo* de Setälä.

Inter la plej modernaj metodologiaj inklinoj estas la strukturisma kiu, kiel ni jam vidis, bazas la instruadon sur la lernado de la lingva materialo strukturita. Tiu procedo ŝajnas la plej responda al la modernaj teorioj kaj al la natura sciiga procezo. Kun tiu metodo estas necesa atenta esploro pri la vortara materialo, kaj adekvata aranĝo de la reto de la bazaj strukturoj.

Ekzistas kompreneble libroj, kiuj jam planis tiun laboron, ekzemple *Esperanto 1* de Szerdahelyi. Bona aranĝo de la lernmaterialo estas en la teksto de Perrenoud *La ora metodo*. Laŭ la aŭtoro, la baza vortrezoro konsistas el 300 elementoj pere de kies kono oni povas kompreni la tri kvinonojn de iu ajn

teksto; Perrenoud dividas ĉi tiujn 300 elementojn en 20 lecionojn. Anstataŭ la nigra tabulo li uzas 181 slipojn, en kiuj estas skribitaj la bazelementoj, t.e. finajoj, prefiksoj, sufiksoj, prepozicioj, konjunkcioj, pronomoj, korelativoj ktp. Kunmetante la slipojn, oni formas la vortojn. Krom la formado —en la menso de la lernanto— de la kombinkapablo, estas grava afero la manipulado. Ŝajnas al mi superflue klarigi al instruistoj la gravecon de manipulado en la instrua procezo.

Se al strukturismaj konceptoj ni ŝuldas la aranĝon kaj pretigon de la lingva materialo, ni ne devas forgesi la kontribuon de la tehniko, t.e. la diversajn vidajn kaj aŭdajn aparatojn, kiuj permesas konkretigi la lecionojn sub pluraj aspektoj. Surbendigiloj, projekciiloj, gramofonoj, filmoj, diapozitivaj ktp., permesas krei pli efikajn rilatojn kun la realo. Pli efikaj, mi intencas diri, ol la tradiciaj instrumentoj kiujn la instruisto havis je dispono: lia voĉo, la lernolibro, la nigra tabulo. Validas ĉiam la fakto, ke la tehnikaj aparatoj estas valoraj iloj enmanigitaj al instruisto, kiu kapablas ilin uzi kaj ne nur tehniko. Ankaŭ la lingvaj laboratorioj, pri kiuj nuntempe oni multe parolas, kaj kiuj estas la optimumo kiun la tehniko disponigas, estas konsiderindaj nur rilate la uzadon fare de bona instruisto. Sen kalkuli krome, ke la instalado de la lingvaj laboratorioj en ĉiuj lernejoj estas problema afero antaŭ ĉio pro la kosto.

Krom la metodo, kiu utiligas la lingvajn laboratoriojn, estas aliaj nuntempe, en la kampo de la lingvoinstruado, sed pro la fakto ke ili ne estas uzablaj en la lernejoj, por ni ili havas limigitan intereson. El tiuj, mi nomas ekzemple la "ASTP (*Army Specialised Training Program*) metodo", aŭ "intensa metodo", kiun oni utiligis por la usonaj trupoj dum la dua mondmilito. Pere de tiu metodo, oni sekvas densigitajn kursojn, tial mallongajn, kun vere multaj horoj da studado ĉiutage. Praktike, oni studas la lingvon la tutan tagon, kompreneble helpe de kiel eble plej multaj tehnikaj rimedoj; la materialo estas programita, kaj estas ĉefe prizorgata la buŝa lingvo.

Alia metodo, kiu por ni ne havas tro da intereso, estas la hipnopedio (dormo-instruo), kiu profitas de la dormhoroj. Oni metas sub la kapon kusenon vibrantan, kunligitan kun speciala surbendigilo kiu multfoje ripetas saman tekston dum la dormo. Profitante de la karakteroj de la dormo, oni povas dumnokte lerni lecionon. Tiun metodon, kiun oni asertas tre efika, oni ne povas altrudi kiel unikan formon de lernado; maksimume ĝi povas servi kiel kompletigon al la lerneja instruado.

Post tia panorama skizo estas kompreneble ke ni demandu nin: kiu estas la metodo, kiun ni devas sekvi en la Esperanto-instruado? Mi povas nur ripeti kaj substreki ke supera metodo ne ekzistas, ĉar tro da elementoj konkuras en la instruprocezo kaj la adoptita metodo devas elstariĝi el la sumo de tiuj elementoj: la instruisto, la medio, la helpiloj, la cirkonstancoj ktp. Nur en konkreta situacio oni povas paroli konkrete paroli pri metodo. Mi povas nur diri al vi kiu estas la metodo sekvata ĉe la lernejo *Oltresavio*. Esperanto, en la aparta situacio de ĉi tiu nia lernejo, estas deviga lernobjekto, enkondukita en la normala lerneja horaro, por ĉirkaŭ 400 lernantoj.

6 Ĉi tiuj sciigoj estas gravaj por kompreni, ke ne tiom la ludaspekto oni devas

evidentigi —kiel estus por eksterlerneja kaj libervola instruado— kiom la kunigo kun la aliaj lernobjektoj. Unuarange oni taksas la gramatikan aspekton de Esperanto, kiu fariĝis valora kompara elemento; fakte la rilato inter Esperanto kaj la itala lingvo surbaze de strukturismo, starigas kunigon inter la du lernobjektoj, el kiuj eliĝas reciproka avantaĝo. Sekve en miaj lecionoj estas grava la instruado de la lingvo laŭ la strukturaj principoj kune kun valorigo de la gramatika aspekto. Eniras en la instruado ankaŭ iom da "ora metodo" —adaptita— por enmeti la manipulan aktivan momenton. La bazaj elementoj surskribitaj sur paperslipoj por la kunmeto de vortoj kaj frazoj estas uzataj sur magnetita tabulo, kio igas pli rapida kaj interesa la kunmeton. Tio estas la konstrua aspekto de la lingvo, venas poste la utiligo de la lingvo, kiu havas sian fokuson en la konversacioj, kies deira punkto povas esti rakontetoj aŭ la dialogoj de nia libreto, temaj bildoj (sur afiŝoj), vizitoj al la ĉirkaŭa medio, internacia korespondado. Por riĉigi kaj kompletigi la lecionon, ni havas je dispono diversajn aŭdajn kaj vidajn aparatojn. Aliaj interesaj momentoj, kiuj permesas plurajn kunligojn estas tiuj de la dramigado kaj la kanto.

Forpasis nia Honora Prezidanto

PIET KORTE

la verkinto de la internacie fama lernolibro por infanoj "Sub la verda standardo" la lernilo de la lerneja eksperimento de I.L.E.I. en la 2a regiono.

Li estis la fondinto de nia sekcio kaj kunfondinto de I.L.E.I. post la teruro de 1940/1945.

Nia movado perdis tre kapablan pedagogon.

Per nia laboro ni honoru lin.

Instrui per televido: rimarkoj kaj spertoj

de H.M. Schippers

Iom post iom la aro da instruiloj grandiĝas. Ne plu la nigra tabulo, kredo kaj libro estas la nuraj iloj uzataj. Rimedo pli kaj pli renkontata en diversaj lernejoj estas la televido. Ankaŭ por la internacia lingvo ĝi estas uzata kelkfoje.

En 1972 TELEAC, la televida akademio nederlanda, elsendis esperanto-kurson post persistaj klopodoj diversflankaj. La rezultoj kaj spertoj estas analizindaj kaj transdonindaj.

Speciala rimedo.

Laŭ la statistikoj la plimultaj homoj posedas televidilon, uzeblan ne nur por amuziĝo, sed ankaŭ por informiĝo. Televidistoj spertis, ke la informa flanko de ĉi tiu rimedo estas granda, sed tamen duaranga por la publiko. Malgraŭ tio ĉiu elsendata kurso atingas tiom multe da lernemaj homoj, kiujn oni ne atingas per ordinara kurso.

Tiuj du avantaĝoj: multe spektata rimedo kaj granda aro da kursanoj, faras la televidon logan por transdoni instruon pri Esperanto; aldona avantaĝo estas, ke moderna homo instruiĝas ne plu nur per la kutimaj lerniloj, sed ankaŭ per la modernaj aŭdvidaj. Hodiaŭ la ilo, kiu kunigas tiujn aspektojn aŭdvidajn en unu aparato, estas disponebla al ĉiu homo.

Tamen ekzistas kelkaj malavantaĝoj. Unue ĝi estas libervola, nedeviga: ĉiu 'povas', sed ne 'devas' instruiĝi per ĝi; la interesitoj povas facile ĉesi post kelkaj lecionoj. Tial ĉiuj televidaj programoj devas esti mallongaj pro ebla perdo da interesiĝo, kaj ankaŭ pro multekosteco. Konklude la kursgvidanto devas interese kapti montri multon en mallonga tempo.

Due, televido en si mem estas nur unu el la instruiloj: memstara ĝi neniam estas, kaj nepre bezonas eldonon de diversaj aliaj helpiloj.

Trie, ne eblas havi rektan kontakton kun la kursano, pro kio fakte la rezulto de la prezentata lernaĵo ne estas konstata. Pri tiuj du specoj da faktoroj –avantaĝoj kaj malavantaĝoj– oni devas konscii, antaŭ ol komenci plani televidan kurson.

Diversspecaj kursoj.

Kvankam malgranda grupo da spektantoj aliĝas al la kurso, kaj mendas la bezonatan materialon, oni devas pripensi, ke multaj nekursanoj rigardas la ekranon dum la kursa elsendotempo. Ĉiu kursverkisto fiksas sian spektantaron: aŭ la kursanojn, aŭ la kursanojn kaj la hazardajn spektantojn.

Se oni prezentas kurson pri la angla, tiam estas klare, ke ĉiu homo scias, kio estas tiu lingvo kaj en kiu lando ĝi estas parolata. Esperanto okupas alian pozicion: multaj homoj neniam aŭdis pri ĝi, aŭ ne scias, kion Esperanto enhavas. La kurso pri Esperanto, laŭ tiuj konsideroj, estu ducela:

1. instrui bazan scion pri Esperanto;
2. komprenigi kio Esperanto estas, kaj kiel ĝi uzeblas.

En la nomita televida kurso oni klopodis kunigi ambaŭ aspektojn. Tial ĉiu leciono enhavis instruon kaj informan partojn. Samtempe por logi la publikon oni prezentis ĉion en amuza 'jako', ĉar oni konsciis, ke la distra flanko de tiu rimedo estas tre ŝatata. Pri tio zorgis du konataj satiraj aktoroj, kiuj ludis humurplenajn simplajn skeĉojn, kiuj enhavis ĉiujn novajn vortojn kaj gramatikajn erojn. Samtempe la instrua parto enhavis multajn komikajn desegnaĵojn.

La efiko estis, ke multaj homoj rigardis pli ol unu leciono, kvankam ili ne intencis lerni Esperanton. Tamen miksi seriozan instruon kun komikaj eroj povas enhavi la riskon, ke kelkaj homoj (multfoje esperantistoj mem) estas trompataj de tiu komikeco, kaj supozas la kurson neserioza.

Didaktikaj eblecoj kaj problemoj.

Krom la enhavo du-aspekta, ĉisupre menciita, la kurso povas havi diversajn formojn el didaktika vidpunkto. Oni povas dediĉi sin nur al la lingvaj aspektoj, kiel gramatiko, frazkonstruado, vortformado, ktp. Tiam la ĉefa celo de la kurso estas, ke poste la kursano havas sufiĉan bazan scion pri la lingvo. Flanke de tiu aspekto estas imageble, ke oni montras la praktikon de la lingvo, kaj tial akcentas ankaŭ la parolatan lingvon.

Teorian kaj praktikan oni devas samtempe prezenti, kaj tion ekzemple la TELEAC-kurso faris. Praktika elirpunkto estu trovebla en la unua ero de ĉiu leciono, responde al la demando: "kie oni uzas Esperanton en la praktiko?". Por aliaj lingvoj tiu problemoj estas tuj solvebla, ĉar lingvon oni parolas en la lando, kie ties lingvanoj loĝas. Sed, kvankam oni diras, ke la tuta mondo estas esperantujo, por neesperantistoj tiu 'lando' ne ekzistas. Vere bezonata Esperanto estas en internaciaj kunvenoj, kongresoj, ktp. En la programo oni elektu la situacion, en kiu du diverslingvanoj renkontas unu la alian, kaj sekve devas peri per iu lingvo, en ĉi tiu okazo per Esperanto. En la TELEAC-kurso unu el la aktoroj uzis la nederlandan lingvon, kiam li ne direktis sin al la alia aktoro, sed en interparolo li uzis kompreneble Esperanton. Por tiu renkontiĝo oni povas krei diversajn scenajn fonojn. Ekzemple por la TELEAC-kurso oni elektis la situacion, ke du ŝippereantoj alnaĝas al nekonata, neloĝata insulo.

En la enkondukita sceno de ĉiu leciono oni prezentu al la kursano la novajn gramatikajn erojn, kaj la novajn eblecojn por vortformado. Partoj el tiuj scenoj estu

la elirpunkto por la klarigado en la libro, akompananta la kurson. Tiujn klarigojn oni donu ankaŭ en la televida programo. Speciale oni devas konsideri, ke nekonata estas la lingva nivelo de la kursano, tial nur simplaj klarigoj taŭgas: vortoj ne sufiĉas, vida aspekto per desegnaĵoj kaj grafikaĵoj estas deviga.

Por aktivigi la kursanojn estas uzbla la metodo de frazkonstruo. Jen kelkaj ekzemploj:

Mi <i>dormas</i> en la <i>dormejo</i>	Mi manĝas supon.
Mi <i>kuiras</i> en la	Mi manĝasn.

La kursano devas parole kompletigi la ekzemplojn. Pli trafe oni povas fari tion per la metodo de demando kaj respondo, unue dum la elsendo, poste hejme helpe de la libro kaj eventuale gramofondisko. Jen kelkaj aliaj ekzemploj:

Ĉu vi povas <i>tranĉi</i> la kokino?	Jes, ĝi estas (tranĉebla).
Per kio mi <i>kombas</i> ?	Mi kombas per (kombilo).
Kien li iras?	Li iras (en la domon).
La viro <i>trinkas la tutan tagon</i> .	Li (trinkadas).

Tiu maniero de klarigado havas kelkajn avantaĝojn. Ĝi stimulas al aktiva partoprenado fare de la kursano. En la elsendotempo la kursgvidanto demandas, donas tempon al la kursano por respondi, kaj poste diras la respondon. Tre bone estas, ke la gvidanto helpas la kursanon per senvoĉa, lipmova dirado de la respondo, kiam estas la vico de la kursano. Tiun respondmanieron tiu lasta povas ripeti dum la tuta semajno, ĉar li jam al kutimiĝis al tiu studmaniero. Due, tiu maniero ebligas al la kursano tuj kontroli, ĉu li bone prononcis, ĉu li bone komprenis la klarigon, kaj ĉu li bone uzis la gramatikaĵon en la frazkonstruo. Tiujn du avantaĝojn oni bezonas, ĉar ili estas la nuraj kontaktabloj, kiujn la gvidanto havas.

Ĉar la prezentanto ne konas la nivelon de la kursano, li ne scias, ĉu li vere havas kontakton kun la kursano. Antaŭ la kurso li devas eksperimenti kun grupo, konsistanta el homoj diversnivelaĵoj. Kvankam la instruo per frazkonstruo estas tre facila (do avantaĝa), kaj instigas al la kursanoj tuj paroli kaj uzi la lernitaĵojn, kaj poste studi sammaniere, tiu povas konduki al papaga respondmaniero. Tiam la kursano povas flue uzi la konstruon, sed ne scias, kion li diras. Li uzas nur la proponitan vorton en konstruo, kiun oni diktis al li. Tio estas evitebla: en la gramatika parto de la menciita kurso oni neniam donis vorton sen desegnaĵo, kaj ne plu povis uzi vorton aŭ konstruon sensignifan. Per ripeto postleciona tiu ligo firmiĝos. Tiuj desegnaĵoj nepre estu en la kurslibro, por ke la ripeto estu kiel eble plej fruktodona.

Tiu metodo de variigo de frazkonstruoj enhavas alian malavantaĝon por Esperanto: la monotoneco. La lingvo estas tre regula, kaj ne havas escepton; kvankam tio estas granda avantaĝo, ĝi povas tiel simpligi la uzatan instruometodon, ke ĉiu nova ekzerco ŝajne estas ripeto de la antaŭa. Por tion eviti oni devas elpensi aliajn ekzercojn, por ke variado estu. Tamen oni zorgu pri facileco de tiuj aliaj ekzercoj.

Post la enkonduka sceno, enhavanta novajn lernotaĵojn, kaj la dua parto kun la klarigo kaj encerbigado de la frazkonstruoj, tria parto en la leciono estas bezonata. Por kuraĝigi la studenton, facile komprenebla sceno en Esperanto estas

loga. Tiu sceno enhavu la prezentitajn kaj klarigitajn erojn, sed restu facila. Per la ideo, ke la kursano jam tiel rapide ion lernas kaj povas uzi, oni stimulas lin al plua studado post la leciono.

En la TELEAC-kurso oni aldonis plian informan parton pri Esperanto. La decido fari tion ekestis pro la fakto, ke malmultaj homoj scias ion pri la uzo de Esperanto en diversaj terenoj. Tiel en ĉiu leciono ĉeestis gasto, prefere eksterlanda, kun kiu la kursgvidanto parolis pri iu temo: literaturo, turismo, junularo, religio, scienco, ktp. Tio ebligas al la kursanoj daŭrigi sian intereson pri Esperanto post la kurso. Dua celo tiam estis, ke hazardaj spektantoj, kiuj sufiĉe bone povis kompreni la unuan skeĉon, ekhavis informojn pri Esperanto. Interparoloj kun eksterlanda gasto estis tial tradukitaj per surekranaj subtitoloj.

Grandigo de la profito de la kurso.

La profiton de kurso oni ne povas mezuri. Ĉiu lernanto en ordinara kurso povas tuj reagi al la instruo, per rimarko, ke li jes aŭ ne komprenas la klarigon. Ankaŭ aldonajn klarigojn la kursano povas peti. La kursgvidanto povas per demandoj tuj kontroli, ĉu li atingis la celon. En posta leciono denove la kursano povas reveni al la problemoj de antaŭa leciono, kaj kursgvidanto povas per ekzercoj aŭ alimaniere kontroli, ĉu la kursano posedas la studitaĵojn. Tiuj reagebleco, kontrolo kaj kontakto tute mankas en televida kurso. Tiun econ de televida kurso oni funde pripensu antaŭe, por ke tamen la profito kaj efiko estu kiel eble plej grandaj.

Kelkaj uzeblaj proponoj por atingi tion estas jenaj:

- la akompana libro estu kiel eble plej klara laŭ klarigo pri la donita studmaterialo, kaj donu la eblecon trovi respondon al la kursanaj respondoj,
- en la kurso oni uzu ankaŭ aliajn vidajn ilojn, kiel desegnaĵojn, grafikaĵojn, por ke la bildo akompanu kaj subtenu la donitan klarigon. Tiuj vidaj iloj estu retroveblaj en la kurslibro,
- uzeblaj estas ankaŭ aŭdaj iloj, ekzemple gramofondiskoj, sonkasedoj. Per tiuj iloj la kursano povas reimagi la instruprocedon de la vidita leciono, povas kontroli sian prononcadon kaj sian studprogreson. La tekston de la aŭdaj iloj estu denove en la libro,
- per televida kurso oni esperas atingi grandan aron da kursanoj. Tamen tiu granda aro estas malfacile manipulebla; eble malgraŭ tio oni klopodu havi aldonajn buŝajn kunvenojn, kie eblas kontakto kun iu klariganto, kaj kie eblas, ke kursanoj renkontu aliajn kursanojn. Tiam oni povas demandi, doni ekstrajn klarigojn, kontroli la studrezulton,
- por havi alian kontakton kun la kursanoj aŭ reagocentron, eblas formi informojn, kie estas haveblaj pliaj klarigoj, respondoj al gramatikaj kaj tiaspecaj demandoj, pliaj informoj pri la praktika uzado de Esperanto, pri aldona studmaterialo. La ekipado de tiu informcentro ne estas facila, ĉar antaŭe oni ne povas scii, kiom da homoj oni bezonos por tio.

Eble tiuj rimarkoj kaj spertoj iom helpas al gvidantoj kaj verkistoj de estontaj televidaj kursoj. Ne tro alte taksu la nombron de la kursanoj, ĉar TELEAC mem spertis, ke estas alta la nombro de aliĝoj al kurso, kiun la homo, laŭ supozo, vere bezonas (ekzemple kurso pri betono, kiam la labormetodoj ŝanĝiĝas), sed por aliaj kursoj la kursano-nombro estas varie alta. Antaŭ Esperantokurso televida, la homoj devus unue scii, ke ili vere bezonas tiun lingvon en internaciaj kontaktoj, kaj tiam sukceso estas duone garantiita.

JARA STATISTIKO PRI ESPERANTO-KURSOJ

Laŭ la decidoj de la Maribora Konferenco en la jaro 1973a, ĉiun jaron, la 15an de novembro, la landaj sekcioj devas raporti statistike pri la diversaj lernejoj, en kiuj oni instruis esperanton. Por la unua fojo, oni devos indiki la lernejojn en kiuj okazis kursoj pri esperanto ĝis la 15a de novembro 1977a.

Kompreneble, same interesos por ĝenerala statistiko pri la instruado de esperanto, la indiko de la kursoj okazintaj ekster la lernejoj – ĉe esperantoklubo, ĉe sidejoj de aliaj kulturaj organizoj, ktp.

sekvas ĉe la malantaŭo de la folio →

		Raporto de
		Informliveranto
		Adreso
	
Kursospeco:	<input type="checkbox"/> deviga	
	<input type="checkbox"/> nedeviga	
Nivelo:	<input type="checkbox"/> elementa	eventualaj klarigoj
	<input type="checkbox"/> progresiga
	<input type="checkbox"/> supera/literatura
	<input type="checkbox"/> instrujtiga
instruhoroj entute		
komenca dato		haltiga aŭ fina dato
ĉu aranĝitis fina ekzameno?		<input type="checkbox"/> jes <input type="checkbox"/> ne
Temas pri:	<input type="checkbox"/> universitato	<input type="checkbox"/> supera lernejo
	<input type="checkbox"/> mezgrada lernejo	<input type="checkbox"/> elementa lernejo
	<input type="checkbox"/> klubejo	<input type="checkbox"/> privata domo
	<input type="checkbox"/>	

*Ĉi apude vi trovas kolor-paperan folion. Ne preteratentu ĝin:
Temas pri provo science statistiki la kursojn pri la Internacia
Lingvo okazantajn en la mondo – plua paŝo al profesia studo
de la propagandoblecoj por nia lingvo.*

Via kunlaboro estos do ege aprecata, kaj tre valora por la movado.

Ĉiu sekciestro kolektos la informojn el la diversaj urboj de la lando, kie okazis kursoj pri esperanto, plenigos la enketilojn kaj forsendos ilin antaŭ la 31a de majo de la koncerna jaro (en ĉi unua enketo pli frue ol la 31a de majo 1978a) al la vicprezidanto de ILEI:

Johano Ingusz – Liget u. 40 – H-1120 Budapeŝto – Hungarujo

Oni devos plenigi apartan enketilon por ĉiu unuopa kurso; se ili ne sufiĉas, oni uzu samformatan paperon, aŭ petu pluan provizon.

Por ebligi la kiel eble plejan kompletecon de la enketo, ni petas ankaŭ ĉiun individuan ricevanton de IPR statistiki al la vicprezidanto pri ĉiuj esperanto-kursoj pri kiuj li estas informita.

La pozitiva rezulto kaj konkreta sukceso de la jara statistiko dependos de la akurateco de la laboro farota de la sekciestroj kaj de la unuopaj instruistoj en ĉiuj landoj.

Se ĉiu sekciestro kaj unuopa membro laboros diligente, ILEI havos ĉiun jaron fidindan statistikon pri la instruado de esperanto en la tuta mondo, kaj la estraro povos transdoni ĝin, laŭ la interkonsento pri kunlaboro, al UEA, kaj ĝin uzi por informado kaj dokumentado de instruinstancoj en la diversaj landoj kaj de UNESKO.

Adreso de la instruejo

Adreso de la organizanta instanco aŭ persono

Adreso de la instruisto aŭ instruistoj

Uzita lernmaterialo (lernolibro, legolibro k.t.p. – indiku nur la devigan materialon: pri konsilitaj libroj kaj simile, vi povas aldoni apartan liston)

Lernantoj: kiom da lernantoj komencis la kurson?

 kiom da lernantoj finis la kurson?

 kiom da lernantoj ekzameniĝis?

 kiom da lernantoj sukcesis en la ekzameno?

Minimuma aĝo de la lernantoj

maksimuma aĝo de la lernantoj

mezuma (averaĝa)* aĝo de la lernantoj

* por kalkuli la averaĝon de la aĝo, sumu la aĝon de ĉiu lernanto kaj dividu per la nombro de la lernantoj.

Raporto de

Informliveranto

Adreso

Kursospeco: deviga

nedeviga

Nivelo: elementa

progresiga

supera/literatura

instrurajtiga

instruhoroj entute

komenca dato

ĉu aranĝitis fina ekzameno? jes ne

Temas pri: universitato supera lernejo

mezgrada lernejo elementa lernejo

klubejo privata domo

.....

eventualaj klarigoj

haltiga aŭ fina dato

Raporto de

Informliveranto

Adreso

Kursospeco: deviga

nedeviga

Nivelo: elementa

progresiga

supera/literatura

instrurajtiga

instruhoroj entute

komenca dato

ĉu aranĝitis fina ekzameno? jes ne

Temas pri: universitato supera lernejo

mezgrada lernejo elementa lernejo

klubejo privata domo

.....

eventualaj klarigoj

haltiga aŭ fina dato

Adreso de la instruejo

Adreso de la organizanta instanco aŭ persono

Adreso de la instruisto aŭ instruistoj

Uzita lernmaterialo (lernolibro, legolibro k.t.p. – indiku nur la devigan materialon: pri konsilitaj libroj kaj simile, vi povas aldoni apartan liston)

Lernantoj: kiom da lernantoj komencis la kurson?
 kiom da lernantoj finis la kurson?
 kiom da lernantoj ekzameniĝis?
 kiom da lernantoj sukcesis en la ekzameno?

Minimuma aĝo de la lernantoj

maksimuma aĝo de la lernantoj

mezuma (averaĝa)* aĝo de la lernantoj

* por kalkuli la averaĝon de la aĝo, sumu la aĝon de ĉiu lernanto kaj dividu per la nombro de la lernantoj.

Adreso de la instruejo

Adreso de la organizanta instanco aŭ persono

Adreso de la instruisto aŭ instruistoj

Uzita lernmaterialo (lernolibro, legolibro k.t.p. – indiku nur la devigan materialon: pri konsilitaj libroj kaj simile, vi povas aldoni apartan liston)

Lernantoj: kiom da lernantoj komencis la kurson?
 kiom da lernantoj finis la kurson?
 kiom da lernantoj ekzameniĝis?
 kiom da lernantoj sukcesis en la ekzameno?

Minimuma aĝo de la lernantoj

maksimuma aĝo de la lernantoj

mezuma (averaĝa)* aĝo de la lernantoj

* por kalkuli la averaĝon de la aĝo, sumu la aĝon de ĉiu lernanto kaj dividu per la nombro de la lernantoj.

Projekto de UNESKO pri asociiĝintaj lernejoj

traduko liverita de UEA

Intenco.

La ĉefa celo de la *projekto de asociiĝintaj lernejoj en la edukado al internacia kunlaboro kaj paco* estas instigi elementajn kaj mezajn lernejojn kaj instruistajn seminariojn elektitajn de siaj naciaj Unesko-komisionoj organizi specialajn programojn, kiuj celas pliigi scion pri mondaj problemoj kaj internacia kunlaborado, disvolvi internacian komprenadon per la studado de aliaj popoloj kaj kulturoj, kaj plifortigi la komprenadon kaj la observadon de la principoj de la homaj rajtoj. La fina celo estas antaŭenigi la ĝeneralan evoluon de la edukado al internacia kompreno per la laboroj de vasten disigita reto de lernejoj filioj.

Historio.

La antaŭenigo de internaciaj komprenado kaj paco per la lerneja edukado estas dekomence unu el la bazaj celoj de Unesko, kaj la Ĝenerala Konferenco de Unesko, ĉe ĉiu el siaj dekok sesioj, akceptis rezoluciojn tiucelajn. Tra la jaroj edukistoj kaj instruistoj kunlaborantaj kun Unesko produktadis imponan provizon de novaj ideoj kaj sugestoj pri la edukado al internacia kompreniĝo. Oni havis la opinion, ke Unesko devus helpi lernejojn kaj instruistojn ilin praktikigi. Tial, per plana kunveno okazigita en novembro 1953, la *projekto de asociiĝintaj lernejoj en la edukado al internacia kunlaboro kaj paco* estiĝis kiel la logika venonta paŝo en la agado de Unesko por antaŭenigi la edukadon en lernejoj al internacia kompreniĝo kaj paco.

En Parizo ĉe la unua kunveno de la asociiĝintaj lernejoj estis 21 partoprenantoj, reprezentantaj 33 lernejojn el 15 ŝtatoj-membroj. Estas nun proksimume milo da partoprenantaj lernejoj en 63 ŝtato-membroj je elementa, meza kaj instruprepara niveloj. Membraj lernejoj troviĝas en Afriko, Azio, Oceanio, Mezoriento, Eŭropo, Latinameriko kaj Nordameriko, en landoj, kiuj reprezentas ne nur malsamajn kulturajn tradiciojn kaj malsamajn stadiojn de la disvolviĝo, sed ankaŭ malsamajn ekonomiajn kaj sociajn sistemojn.

Atingitaj rezultoj.

La *projekto de asociiĝintaj lernejoj* servadas kiel efika rimedo por vastigi al lernejoj en multaj malsamaj landoj la edukan aktivadon de la *organizo por internacia komprenado kaj paco*. La projekto amasigadis tra la jaroj valoran sperton koncerne metodojn kaj programojn, kiel ankaŭ esplorajn kaj kontrolajn problemojn. Ĝi produktis realajn rezultojn en multaj landoj — ekzemple, pli bonan adaptadon de studtemoj kaj programoj al la celoj de la kompreniĝado internacia, produktadon de novaj instrumaterialoj, kaj pli grandan intereson fare de edukinstancoj kaj instruistoj pri la problemoj kiel tuto, kaj pri demandoj kiel ekzemple la edukaj esplorado kaj evoluigo.

Sugestitaj studtemoj.

Specialaj programoj plenumataj de lernejoj-membroj koncentriĝas je kvar interrilataj studterenoj:

- i la celoj kaj laboro de Unuiĝintaj Nacioj kaj ties specialigitaj instancoj;
- ii homaj rajtoj;
- iii liaj landoj kaj kulturoj;
- iv la homo kaj la medio.

Tiuj temoj provizas facile adapteblan kadron por la edukado al internacia kompreniĝo. Oni povas preskaŭ senfine variigi kaj disvolvi ĉiun temon, kaj ili ĉiuj interrilatas laŭ manieroj, kiuj ebligas, ke la studado de unu enkonduku kaj plibonigu la studadon de la aliaj.

Tra la jaroj, tamen, la emfazo transŝoviĝis de certaj aspektoj de la temoj al aliaj — afero tute natura kaj bona. Ekzemple, en la instruado pri Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝiaj parencaj instancoj, multaj lernejoj prenis kiel startopunktojn mondajn demandojn kaj problemojn anstataŭ komenci ĉe la institucioj mem. Pli kaj pli, la studado pri aliaj landoj kaj kulturoj inkluzivas esploradojn pri sociaj, ekonomiaj, mediaj aŭ evoluigaj problemoj. Studoj pri la homaj rajtoj pli kaj pli ofte pritraktas ne nur abstraktajn principojn, sed ankaŭ aktualajn nuntempajn situaciojn, kiuj rilatas al homaj rajtoj en la loka regiono, en la nacio kaj en la mondo.

Aliaj studtemoj.

En la kunteksto de la supraj kvar temoj, oni invitas la lernejojn priatenti tiajn nuntempajn demandojn, kiaj la evoluigo, kaj lokaj problemoj kun interkulturaj implicoj. La forta inklino al programoj de studado kaj agado, kiuj fokusiĝas je veraj nuntempaj problemoj, estas ja bonvena, ĉar la efikeco de la programo dependas de tema materialo viva, aktuala kaj, precipe, konforma al la koncerno kaj interesoj de la hodiaŭa junularo.

Programa planado.

La *projekto de asociiĝintaj lernejoj* jam demonstris sub plej diversaj kondiĉoj ne nur, ke eblas plenumi la programojn sen troŝarĝi aŭ disrompi la lernejan

studtemaron, sed ankaŭ, ke tia instruado pliriĉigas la enhavon kaj pliigas la efikon de lernejoj. Inter la plej sukcesaj programoj estas tiuj planitaj por akordi kun pluraj studkursoj en la lerneja studtemaro. Tiel, oni uzadas multajn rimedojn de la instruprogramejo, kaj la respondeco por la konstruado de programejo estas dividita inter kelkaj instruistoj. Tio implicas intiman kaj daŭran kunlaboradon inter la koncernaj instruistoj, efikan gvidadon kaj kunordigadon. Por certigi maksimumajn interesojn kaj partoprenadon, oni prefere elektu la studtemojn interkonsente kun la lernantoj, kaj la temoj estu tiuj plej bone ligeblaj kaj apogaj al la normala laboro de la lernejo. Kursoj pri historio, geografio kaj sociaj studoj ĝis nun plej ofte provizis la kadron por agado pri projektoj, sed fremdaj lingvoj, civitaj studoj, nuntempaj eventoj, naturaj sciencoj, arto kaj muziko ankaŭ faris siajn kontribuojn al multaj programoj. La amplekso kaj daŭro de difinita projekto multe variis de unu lernejo al alia, depende de la elektita studtemo, la metodoj uzataj, la materialoj haveblaj, la aĝo de la lernantoj, kaj aliaj faktoroj.

Metodoj kaj materialoj.

Estas aksiome, ke internacia kompreniĝo konsistas el elementoj intelektaj, sociaj kaj afektaj, kaj, ke tiuj edukaj metodoj, kiuj liveras al lernantoj kaj studantoj plenajn okazojn por grupaj kaj individuaj iniciatoj, respondecoj kaj agado estas plej bonaj por atingi la ĝustan miksiĝon de tiuj elementoj. Dekomence kaj dum la tuta vivo de la projekto, oni utiligis aktivajn metodojn. Oni ĝenerale konsideras ilin la plej efikaj por vekoj kaj teni la interesojn kaj atingi aktivecojn taŭgajn al la projekto. En lastaj jaroj, la termino “aktivaj metodoj” akiris la signifon de tutnova amplekso de metodoj kaj aktivecoj, inkluzive plenan partoprenon de lernantoj en la elektado, planado kaj kontrolado de projektoj; la uzadon de ludoj, simuladoj kaj spertoj en la klasĉambro; kaj la organizadon de programoj, kiuj etendiĝas al la ĉirkaŭlerneja komunumo, kaj ĝin enplektas. Klasoj ofte ĝuas grupajn taskojn kaj trovas en ili profiton. Tiaj taskoj povas inkluzivi ekzemple enketojn, studvojaĝojn, preparadon de arĥivoj el ĵurnalaj eltondaĵoj, aŭ grupajn raportojn. La pli junaj lernantoj ofte ŝatas individuajn taskojn prepari ilustrajn materialojn (afiŝojn, grafikaĵojn, mapojn, glubildojn), ĉar eble ili povas tiumaniere esprimi siajn ideojn pli facile ol per la skribado aŭ diskutado. Projektoj, kiuj celas disvolvi pli bonan konon kaj estimon de aliaj landoj, tiras profiton el korespondado kaj interŝanĝoj kun lernejoj alilandaj. Instruistoj kaj lernantoj, kiuj faras specialajn projektojn, spertis, ke vizitoj de personoj denaske aŭ alimaniere apartenantaj al lando elektita por pristudo, de spertuloj kiuj laboras sur la kampo de teknika asistado, kaj de stabanoj el instancoj de Unuiĝintaj Nacioj, povas fari valoregan kontribuon al iliaj programoj.

Eksterklasaj aktivecoj ankaŭ ludis gravan rolon en la projektoj, kaj kelkaj programoj plenumiĝis tute ekster la klasejo kun gvidado de interesita instruisto. Klubo pri internaciaj rilatoj, artaj, muzikaj kaj dramaj rondoj, kluboj pri Unesko aŭ Unuiĝintaj Nacioj, kaj aliaj lernejoj aŭ studentaj grupoj donis trafajn okazojn

por kulturaj aktivecoj, debatoj pri nuntempaj mondaj problemoj, modelaj asembleoj de instancoj de Unuiĝintaj Nacioj, ekspozicioj kaj dramaj prezentoj kaj partoprenado en monakiraj kampanjoj kiel ekzemple la *sistemo de Unesko-kuponoj*.

Kiam temas pri materialoj, oni uzadu kiel eble plej multe filmojn, diapozitivojn, fotojn, sonbendojn kaj aliajn aŭdvidajn helpilojn. Por uzado kaj internacia kaj nacia, senparolaj bildaj materialoj estas taŭgaj kaj malkaraj. Ofte, tamen, ne estas facile akiri taŭgan materialon por iu ajn el la kvar ĉeftemoj priskribitaj supre. Por venki ĉi tiun ĝenon, instruistoj sin turnis al vasta gamo de fontoj, inkluzive vojaĝagentejojn, alilandajn ambasadojn, komercajn entreprenojn, junularajn organizojn, artgaleriojn, kulturcentrojn kaj fremdajn informajn servojn enlande kaj eksterlande. Materialoj pri Unuiĝintaj Nacioj kaj rilataj instancoj haveblas ĉe la sidejoj de tiuj organizoj kaj ĉe informcentroj de UN tra la mondo. Internaciaj interŝanĝoj de materialoj preparitaj de la lernantoj mem, kiuj priskribas siajn mediojn kaj ĉiutagan vivon, konsistigas efikan manieron por enplekti la pli junajn lernantojn rekte en la lernadon pri la propra kaj aliaj landoj. Tute sendepende de la speco de materialoj uzataj, tamen gravas, ke ili estu aŭtentikaj, ekvilibraj kaj ĝisdataj.

Kontrolado kaj taksado.

Projektoj laŭ la linioj supre sugestitaj valoras por la lernantoj, por la instruistaro kaj por la koncernaj lernejoj. Se, tamen oni celas, ke la laboro havu pli vastan signifon kaj montru la vojon al novaj evoluoj je vasta skalo, necesas studadi la metodojn, programojn kaj materialojn kaj kontroli iliajn rezultojn por ebligi vere objektivan taksadon de ilia efikeco. Oni planu programojn tiom, kiom eblas, kun taŭga atento al tiu ĉi esplora dimensio, kiu rekte helpas la partoprenantojn kaj aliajn, prijuĝi la efikecon de la programoj kaj ilin plibonigi laŭ provitaj spertoj.

Organizado.

a. Rolo de la Sekretariato de Unesko.

La Sekretariato funkcias kiel ĉenero inter partoprenantaj lernejoj en diversaj landoj kaj prenas sur sin respondecon pri kunordigado de la programo kiel tuto. La bulteno de la Asociiĝintaj Lernejoj (vidu eron *c. Dokumentado*) estas grava elemento en la kunordigado de la programo kaj prezentas al lernejoj eblecon anonci sian deziron starigi rektajn interŝanĝojn korespondajn, materialajn kaj informajn. Je la peto de registaroj aŭ Naciaj Komisionoj, Unesko donadis limigitan financan helpon por prepari kaj produkti specialajn dokumentojn kaj instruilojn uzotajn por plenumi projektojn, aŭ por organizi kunvenojn kaj seminariojn pri la Projekto de Asociiĝintaj lernejoj. Por helpi al Asociiĝintaj Lernejoj, la Organizo ankaŭ aranĝis mallongdaŭrajn misiojn de specialistoj por helpi pri la evoluigado de programoj.

b. Rolo de Naciaj Unesko-Komisionoj.

La Naciaj Unesko-Komisionoj elektas partoprenontajn lernejojn en la propra lando kaj funkcias kiel ĉenero en la kunordigado de la Projekto. Kie partoprenas grupo de lernejoj, la Nacia Komisiono kelkokaze prenas sur sin respondecon pri kunordigo de ilia laboro. Pluraj Naciaj Komisionoj trovis utila nomi unu solan komisiiton aŭ-kaj komitaton por direkti la laboron. Naciaj Komisionoj ankaŭ stimulis kaj antaŭenigis la Projekton de Asociiĝintaj Lernejoj per organizado de seminarioj, prizorgo de preparo de instrumaterialoj kaj disvastigo de informoj en siaj bultenoj.

En Ŝtatoj-Membroj, kiuj nuntempe ne partoprenas la Projekton de Asociiĝintaj Lernejoj, Naciaj Komisionoj povus konsideri la eblecon iniciati tiun ĉi agadon. Iu povus eble komenci per kandidatigo de grupo da edukejoj. Tiuj edukejoj povus esti elementaj aŭ mezaj lernejoj aŭ instruistaj seminarioj, aŭ ĉiuj tri. La ĝisnunaj spertoj montras, ke oni atingas pli bonajn rezultojn se oni komencas per limigita nombro da lernejoj.

Ŝtatoj-Membroj estas aparte petataj enmiksi pli da elementaj lernejoj en la Projekton de Asociiĝintaj Lernejoj, kiel ankaŭ pli da metilernejoj kaj instruistaj seminarioj.

c. Dokumentado.

La Sekretariato provizas al partoprenantaj institutoj informmaterialon pri la Projekto kaj pri Unesko ĝenerale, kaj abonojn al diversaj periodaĵoj de Unesko, kiel ekzemple la *Unesko-kroniko*, *Unesko-kuriero*, *Unesko-artikoloj* kaj *Internacia Kompreniĝo en la Lernejo*. La lastenomita estas duonjara cirkulero, kiu entenas artikolojn pri aferoj interesaj al partoprenantaj lernejoj, novaĵojn pri nunaj projektoj, petojn pri kunlaborado kaj helpado, avizojn pri novaj dokumentoj kaj eldonaĵoj, kiuj eble utilis, kaj aliajn informojn. La Sekretariato ankaŭ helpas al lernejoj elekti kaj akiri pluan dokumentan materialon bezonatan por iliaj specialaj projektoj. En Ŝtatoj-Membroj kie oni nomis komisiiton, Unesko povas disponigi al li specialigitajn materialojn por cirkulado inter la lernejoj. Bazaj dokumentoj pri la projekto inkluzivas la libreton de Unesko *Internacia kompreniĝo lerneja: Progresprezento pri la Unesko-Projekto de Asociiĝintaj Lernejoj*; *Kelkaj sugestoj pri la instruado pri Homaj Rajtoj, kaj mondaj problemoj en la klasejo: Gvidilo instruista pri kelkaj taskoj de Unuiĝintaj Nacioj* de Herbert J. Abraham, kiujn oni vaste distribuis al Ŝtatoj-Membroj kaj Naciaj Komisionoj kaj kiuj donas multajn utilajn ekzemplojn pri projektoj entreprenitaj de Asociiĝintaj Lernejoj je la niveloj elementa, meza kaj instruist-eduka. Limigitaj provizoj de tiuj libretoj, numeroj de la supremenciita cirkulero, kaj listo de partoprenantaj lernejoj estas haveblaj kontraŭ peto.

ĉ. Stipendioj.

Unesko aljuĝas kelkajn stipendiojn al personoj respondecaj pri projektoj. Ili celas ebligi al ili observi projektojn en partoprenantaj lernejoj alilandaj kaj, kiam tio eblas, viziti la Sidejon de UN aŭ Unesko, aŭ aliaj rilataj instancoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Petoj pri partopreno.

La registaro de la Ŝtato-Membro aŭ ĝia Nacia Unesko-Komisiono (aŭ ekvivalenta nacia kunlaborinstanco) estu la peranto de petoj pri partopreno. Tiuj petoj enhavu la jenajn informojn:

- la nomojn kaj adresojn de la proponataj lernejoj, kune kun mallonga priskribo de ĉiu lernejo, inkluzive de la jenaj detaloj: 1. nomo de la lernejestro; 11. nomo(j) de persono(j), kiu(j) estros la specialajn aktivecojn de la lernejo;
- la elektitan studtemon kaj priskribon de la speciala aktiveco (enhavo, metodoj kaj materialoj konformaj, ekzemple, al la *Sugestitaj studtemoj*);
- certigon, ke la lernejo intencas aktive partopreni la Projekton dum almenaŭ du jaroj.

Respondecoj.

- Respondeco por antaŭenigo kaj superrigardo de la projektoj entreprenitaj restas ĉe la Nacia Komisiono aŭ aliaj koncernaj servoj kaj instancoj, kaj ne ĉe Unesko;
- la respondecoj regule taksu la aktualajn aktivecojn kaj sendu raportojn, kune kun specimenoj de iu eventuala nova edukmaterialo, kiun uzas la lernejoj, al la Sekretariato de Unesko (Projekto de Asociiĝintaj Lernejoj en la Edukado al Internacia Kunlaboro kaj Paco);
- la prizorganto(j) de la projektoj certigu, ke la partoprenanta lernejo sendadas al, kaj ricevas de, Unesko ĉiujn esencajn informojn kaj materialojn. Tiu korespondado povas okazi rekte inter la partoprenanta lernejo kaj la Unesko-Sekretariato, aŭ pere de la Nacia Komisiono. Kiel ajn tio okazas, estas esence ke oni tenu daŭrajn kontaktojn, ĉar la sukceso de la Projekto de Asociiĝintaj Lernejoj grandparte dependas de la reguleco de tiu interŝanĝado de informoj.

Selekto de partoprenantaj lernejoj.

Akceptos lernejojn por partopreno la Ĝenerala Direktoro de Unesko surbaze de la sekvantaj konsideroj:

- la eduka valoro de la proponataj aktivecoj;
- eblecoj de etendado de tiuj aktivecoj al aliaj edukejoj;
- la karaktero de la aranĝoj por estrado, kunordigado kaj kontrolado de aktivecoj, kaj por konservado de kontaktoj kun Unesko.


Landoj partoprenantaj en la Projekto de Asociiĝintaj Lernejoj.

Argentino, Aŭstralio, Aŭstrio, Bangladeŝo, Belgio, Birmo, Bjelorusio, Bolivio, Brazilo, Britio, Bulgario, Burundio, Cipro, Ĉeĥoslovakio, Ĉilio, Danio, Dominiko, Egiptio, Ekvadoro, Etiopio, Filipinoj, Finnio, Francio, Gano, FRGermanio, Germana DR, Gvatemalo, Hindio, Hispanio, Honduraso, Hungario, Indonezio, Irlando, Israelo, Italio, Japanio, Jugoslavio, Kameruno, Kanado, Kenjo, Koreio, Malajzio, Malto, Maroko, Maŭricio, Nederlando, Nepalo, Niĝerio, Norvegio, Pakistano, Polio, Rumanio, Svedio, Svisio, Ŝrilanko, Tajlando, Turkio, Ugandio, Ukrainio, Sovetio, Urugvajo, Usono, Zambio.

La verbo, la spino de la lingvo

de Mogens Groth

Tiu ĉi grafikaĵo origine en brajloskribo povus interesi vin:



Kiel legi la skemon?, kion ĝi diras en kutima lingvo? Jen: la verbo havas tri modalojn laŭ fraza funkcio, nome: predikatan, kvazaŭ substantivan kaj adjektivan*; kvara modalo estus verbo-substantivo (= skribo).

1. La finitivo ampleksas verbojn kun finaĵo -os, -as, -is, -us, -u, do puraj verbaj formoj.

2. La infinitivo havas nur unu modon: -i.

3. La participo, modalo kun parte pure verba, parte adjektiva funkcioj, ampleksas verbojn kun finaĵo -ont, -ant, -int, kaj -ot, -at, -it.

Pri 1. La finitivo havas tri modojn: a) la indikan, b) la kondiĉan, c) la ordonan.

a) indikativo indikas, prezentas, agon en os-, as-, is-tempo (futuro, prezenco aŭ preterito = studos, studas, studis).

b) kondicionalo prezentas la agon kiel imagon = mi studus, se...

c) volitivo prezentos agon, kiu okazu = insistu, ke ni progresu!

Pri 2. La infinitivo kun sia sola modo: -i, funkcias en surprize multaj roloj; jen kelkaj el ili: studi utilas (jen subjekto), ŝi lernas iri (objekto), verki egalas tribunali - pri si mem (subjekto, objekto), ili iras studi (adjekto); vivi estas malrapide morti (predikativo al subjekto); oni invitas vin studi (predikativo al objekto), helpu al ili progresi (predikativo al prepozitivo), la arto gimnasti (komplemento al substantivo), preta akcepti vin (komplemento al adjektivo), ĉu malfacile studi? (komplemento al adverbo).

La infinitivo povas tre libere roli, eĉ ekster siaj roloj, nome: kvazaŭ 'volitive': ja vidi sed ne tuŝi!, 'future': kiel legi la skemon, ĉu ĝi informos, kion scii?, 'kondicionalo': ĉu ekdormi jam tiom frue?

La verban karakteron de infinitivo substrekas fakto, ke ĝi povas havi la kutimajn adverbojn: forte vivi, rapide morti, vivi estas pli ol nur malsprite spiri!

Pri 3. La participo havas du voĉojn: aktivan kaj pasivan. Ambaŭ havas po tri ag-statojn: prediktan (-ont, -ot), imperfektan (-ant, -at), perfektan (-int, -it). Predikto antaŭdiras okazon antaŭ la ago: legota estis la teksto; imperfekto esprimas, ke la ago estas ne perfekta, ne finita, ke ĝi daŭras (aŭ ripetiĝas): la teksto estis legata; perfekto prezentas, ke la ago estas finita, aŭ alivorte, la rezulton post ago: la teksto estis legita.

Kaj nun laste: kiel kompreni la strekopunktitajn liniojn malsupre en la skemo, de -is? Imagu situacion: ŝi fermis fenestron; ĉu rezulto: fermita fenestro? Dependas de! La frazo povas signifi: a) ŝi estis fermanta la fenestron. Dum ŝia ago fermi, la fenestro estis fermata; b) ŝi estis ferminta la fenestron, venis al la rezulto post sia ago fermi, ke la fenestro estis fermita.

Por situacio b) eblas imagi, ke iun tagon ekpluvegis, kaj rapide la fenestro estis dum nur sekundoj fermata de ŝi, kaj ŝi sukcesis tute fermi. Post kelkaj sekundoj la fenestro estis ne plu fermata, sed tute fermita, kaj ne plu enpluvegis. Do, se dumaga priskribo: -at, se postaga: -it.

Pri -at kaj -it estas pli por diri, ekzemple ke kelkaj verboj preferas imperfektan -at, aliaj perfektan -it (memorata iu, alia forgesita). Sed por nun sufiĉu; mi fermis.

Protokoloj de la ILEI-estraro en Parizo

La estraro de ILEI kunvenis en Parizo la 1977.11.05an, je la 10a horo, ĉe Liceo Carnot; ĉeestis: rektoro Helmut Sonnabend, prezidanto, d-ro prof-ro Mario Dazzini, ĝenerala sekretario, s-ro Gaston Turin, vicsekretario, s-ro Olle Olsson, kasisto, kaj kiel gastoj: s-ino Marcella Turin, d-rino prof-ino Katina Dazzini.

La estraro interkonsentis pri jena tag-ordo:

1. Vizitoj
- 1 bis Akcepto de reprezentantoj de SAT
2. Konferenco 1978a
3. Preparlaboroj por 1979a (konferenco – ekspozicio – simpozio)
4. Kostoj por estrarkunsidoj
5. Strukturo de ILEI (zonoj – centroj – regionoj – sekcioj)
6. Lerneja eksperimento: eldono de la rezultoj
7. Rilatoj kaj kunlaboro kun aliaj organizaĵoj
8. Eblecoj por plibonigi la lingvan konon de niaj instruistoj
9. Internacia Pedagogia Revuo
10. Konferenco 1980a
11. Lingvistika simpozio en Budapeŝto
12. Diversaĵoj.

1. Vizitoj

1. 0. Ĉe Unesko: la estraro deziras prezenti kelkajn laborpunktojn kiuj rilatas al Unesko.
1. 1. Aranĝota ekspozicio de infandeseĝnaĵoj kaj fotoj pri diversaj temoj de la infana vivo en ĉiuj kontinentoj, okaze de la jaro de la infano en 1979.
1. 2. Organizita internacia simpozio en Parizo sub aŭspicio de Unesko. Ebla ĉefa temo: "Humanismaj kaj lingvistikaj kondiĉoj de lingvo kiel solvo de la mondlingva problemoj".

1. 3. Disvastigi la praktikan uzon de esperanto en la lernejoj de kelkaj afrikaj landoj; disponi pri lernolibroj, studmaterialo kaj instruiloj; perspektive plani ILEI-konferencon en Afriko.

1. 4. Ekscii temojn kiuj rekte rilatas al la laboro de Unesko en kies plenumado ILEI povas transpreni taskon.

1. 5. Vizito al UNESKO – La 8an de novembro, je la 17a horo, s-ro Arsov akceptis la estraron, kiu prezentis la planon pri la ekspozicio de infandeseĝnaĵoj en la "jaro de la infano" 1979 en Parizo. S-ro Arsov mem proponis ekspozicii en la granda halo de Unesko, kaj petis detalajn informojn pri amplekso, daŭro kaj tempo.

La ebla aŭspicio fare de Unesko dependas de la decido de koncerna komitato. Alia demando tuŝis la internacian lernejon kunlige kun financa apogo pere de Unesko. La estraro estis informita ke principe Unesko povas helpi en la formo de kontraktoj, tio estas por ĉiu objekto devas esti aparta kontrakto. Al tiu ĉi demando apartenas la subvencio pri lernolibroj.

La estraro estis informita ke ILEI nun ekde junio 1977 apartenas oficiale al kategorio C. Rilate la simpoziojn s-ro Arsov diris, ke pri la dezirata aŭspicio, nur la Ĝenerala Direktoro povas decidi, kaj sugestis tiucele kontakti la respondeculon de la eduka branĉo, s-ro Zakarijev. Pri asociiĝintaj lernejoj respondecas s-ino Khawajkie. Dezirinde estas, ke post la fino de la ekspozicio ĉe Unesko, ĝi transiru ĉe la kulturen centron Pompidou.

1. 6. Vizito en La Sorbonne – La 8an de novembro, je la 15a horo, la estraro vizitis la universitaton La Sorbonne, kaj estis akceptita de la ĉefo de kabinedo s-ro George Sala. Oni prezentis kaj diskutigis la planitan simpozion dum 1979. La ĉefo de kabinedo principe aprobis la deziron de la estraro, organizi la simpozion ĉe la universitato. Pri la demando ĉu la universitato donos la aŭspicion, s-ro Sala deziras unue informi la Rektoron, ĉar nur li povas doni la permeson. La estraro respondis, ke ĝi antaŭ la fino de la jaro havigos al la universitato la skizan planon de la simpozio, kaj indikos la daton kaj daŭron dum printempo 1979a.

2. 0. Ĉe Universitato “La Sorbonne”
2. 1. Informi pri simpozio en la jaro 1979a kaj demandi ĉu eblas organizi ĝin en la Universitato, kaj peti ke la Universitato estu la invitanto.

3. 0. Ĉe Internacia Centro Pompidou
3. 1. Certigi al ni la eblecon eventuale aranĝi simpozion kaj ekspozicion tie.

1 bis. La estraro je la 15a horo akceptis la reprezentantojn de SAT, s-roj Pierre Levy, G. Chevolat, Adrian Dreschmann kaj Gilbert Lebec.

La du estraroj decidis jenan interkonsenton:

En Parizo ĉe Liceo Carnot, kunsidis la San de novembro 1977a, je la 15a horo, la estraroj de ILEI (Sonnabend, Dazzini, Turin, Olsson) kaj de SAT (Levy, Chevolat, Dreschmann, Lebec) por esplori la eblecojn de kunlaborado.

Post konstato de memstareco kaj sendependeco de ambaŭ organizoj, ili interkonsentis komenci la kunlaboron en jenaj punktoj:

A 1 Disponigi lokon en la oficialaj presorganoj, por informoj kaj artikoloj;

A 2 Interŝanĝo de protokoloj kaj dokumentoj;

A 3 Okazigi laŭnecese komunan estrarkunsidon;

SAT kaj ILEI decidis starigi unuopajn komisionojn cele al la subaj punktoj:

B 1 Organizado de mondespozicio de infandeseĝnaĵoj en la kadro de la

“internacia jaro de la infano” de Unesko;

B 2 Partopreno en la planita simpozio en la jaro 1979a pri ĝeneralaj kaj specifaj lingvaj problemoj;

B 3 Helpado en la teknika organizado de internacia lernejo en la jaro 1979a;

B 4 Proponi kunlaboradon al aliaj organizoj esperantistaj kaj ne esperantistaj por la samaj komunaj celoj.

2. Konferenco 1978a

0. 0. La vicprezidanto, s-ro Ingusz, informis la estraron letere ke la loko de la 12a Internacia Konferenco de ILEI nun estos Nowy Sacz en Pollando, kaj ne Toruń. La estraro akceptis la ŝanĝon.

0. 1. Temo de la konferenco estos: “*Fakaj vidpunktoj en la instruado*”. La estraro opinias, ke sub tiu ĉi ĝenerala temo devus esti traktataj ĉiuj fakoj instruataj en la lernejoj. Inter la eblecoj trakti diversajn temojn de nia faka laboro estas la prelega formo fare de profesoroj pri la fakoj, kombine kun fakaj aldonoj, diskutoj, opinioj de niaj gekolegoj. Laborformo: la komuna pritrakto displitiĝas laŭ fakaj laborrondoj.

La estraro petas la sekiestrojn aldone al la plano nomi atingeblajn profesorojn pri la diversaj fakoj, kiuj ĉiuokaze estas pretaj prelegi dum nia konferenco.

La estraro jam pensas pri jenaj profesoroj:

matematiko – prof. Carlo Minnaja, prof. Lo Giacomo, prof. Guy Bracquemond; d-ro Kassermann, s-ro Maas, d-ro Frank;

lingvistiko – prof. Szerdahelyi, prof. Bausani, prof. Pennacchietti.

La estraro petas, ke preferinde la gekolegoj en la *Centro I* (Budapeŝto) prezentu la prelegontojn por la unuopaj fakoj. Tiel estas garantiata ke ankaŭ niaj kolegoj en la socialismaj landoj povas prelege prezenti siajn ideojn.

0. 2. Letere la ĝenerala sekretario informos s-ron Ingusz pri la detaloj de la

programo, komisiante lin kontakti la organizan komitaton kaj prezenti la decidojn de la estraro.

3. 13a Internacia Konferenco en Locarno

0. 0. La estraro akceptis la proponon de Inspektoro Bertolini organizi ILEI-konferencon en Locarno en la jaro 1979a. Provizoraj datoj estas 1979. 07.28-08.04, tamen ĉiuokaze ne dum la UEA-kongreso. Estrarano de ILEI partoprenos dum 1978a la preparlaborojn surloke.

4. Kostoj por estrarkunsidoj

0. 0. La estraro opinias, ke la vojaĝkostoj de la estraranoj devas esti subvenciataj el eblaj financaj fontoj.

5. Strukturo de ILEI

0. 0. La estraro traktis la fondotan organizan strukturon de ILEI, kaj decidis sondi ĉiujn eblecojn de rilatoj en la diversaj zonoj. En IPR aperos artikolo pri tiu ĉi temo fare de la prezidanto. Konstateblaj jam estas provizore la *Centroj 1 kaj 2* en Eŭropo. La nova strukturo eniru en la statuton de ILEI.

6. Lerneja eksperimento: eldono de la rezultoj

0. 0. La estraro aŭskultis la raporton de la prezidanto, kiu respondecas pri la lerneja eksperimento en la dua regiono. Laŭ tiu ĉi raporto antaŭvideble pretiĝos la raporta libro; li deziras eldoni la libron en Pizo kaj atentigas la estraron ke ĝi apartenu al la eldonota scienca serio de ILEI. La estraro aprobas la ideon.

0. 1. Rilate la eldonon de la rezultoj de la

1-a eksperimento, la estraro unuanime opinias, ke prof. Szerdahelyi informu la estraron ĉu la manuskripto de la scienca kontrolo estas preta por presigi ĝin. Post la pozitiva respondo, la vicprezidanto tuj kontaktu kun la Universitato kaj Ministerio pri Edukado en Budapeŝto por realigi la presadon. Pri la rezultoj, la vicprezidanto informu la estraron.

7. Rilatoj kaj kunlaboro kun aliaj organizaĵoj

0. 0. ILEI jam havas interkonsenton pri kunlaboro kun UEA kaj SAT.

1. 0. Freinet movado – Dimanĉe la 6an de novembro 1977a, s-ro Marin vizitis la estrarkunsidon. La estraro prezentis al li la planon, ke ambaŭ organizaĵoj kunlaboru sur pedagogia kampo kaj sugestis la kunagon rilate la ekspozicion, simpozion kaj internacian lernejon. S-ro Marin volas trakti la proponojn dum estrarkunsido de FIMEM kaj jam confirmis la kunagadon en la ekspozicio.

2. 0. KELI kaj IKUE – Rilate la kristanajn movadojn (Keli kaj Iku), d-ro Dazzini kontaktos IKUE-n, kaj s-ro Olsson KELI-n.

3. 0. Kontaktoj estos dezirindaj kun TEJO, IFEF, ISAE, LIBE, TEĴA, MEL, SEL, KES kaj Eŭropa Esperanto-Centro.

8. Lingva kono

0. 0. La estraro konvinkiĝis pri la fakto de necerta kono de la lingvo flanke de niaj geinstruistoj; por doni konkretan helpon, ĝi decidis ek de la unua numero de la jarkolekto 1978 starigi lingvan angulon kies enhavo celos la plibonigadon de la lingva kono. En ĉiu numero de IPR estu indikitaj la nomoj de la komisiono pri lingva kontrolo kaj averto ke ĉiuj manuskriptoj devas esti kontrolitaj de la komisiono mem.

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO – IPR

organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – ILEI
en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, kategorio C

Aperas trifoje jare

Redaktas: Gaston Turin, 43 rue E. Magnin, F-25300 Pontarlier, Francujo

Poŝtĝirkonto: Stockholm 682 117-7, Olle Olsson, Bantorget 3, S-222 29 Lund, Svedujo

Jara abono: 20 svedaj kronoj

La abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI

Nemembroj de ILEI pagu al la supre indikita konto.